# Esperanto en Danio

17-a jarkolekto • n-ro 5 • novembro 2010

44-a KONFERENCO DE ILEI KOPENHAGO 2011

**Emblemo de la ILEI-konferenco**

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Regin Larsen
Ole Therkelsen

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
Retadreso: eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas

permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.02.2011**

# Enhavo

**44-a ILEI-Konferenco en Kopenhago................................3**
**IKU invitas prelegontojn..........6**
**Internacia Jaro de la Junularo 7**

**Kopenhago..............................10**
**Næstved..................................13**
**Gazeteltondaĵoj......................14**
**3D-filmo en Esperanto!..........14**

**Datreveno................................15**
**Vivanta aŭ mortanta lingvo?. 16**
**Interesiĝo de la ekstera mondo ..................................................18**
**Honorigo de Zsófia Kóródy...20**

**Relanĉo de Edukado.net.......22**
**Pli ol 15 000 tradukitaj Esperanto-frazoj.....................23**
**Tago de la Bunteco................24**

**Interasocia Renkontiĝo.........26**
**Mendo de revuoj por 2011.....27**

# 44-a ILEI-Konferenco en Kopenhago



***Kun lingvo de amo en la lando de Hamleto***

En la jaro 2011 ILEI konferencos en Kopenhago, la semajnon antaŭ la UK, 17- 23 julio, kun la tradiciaj kleriga, faka, organiza kaj kultura programoj, kaj, kiel ĉiam, kun io nova. Tiel la konferencanoj povos plani unuvojaĝe dusemajnan restadon dum la du eventoj por plene ĝui la riĉajn konferencan kaj kongresan programojn, kaj konatiĝi kun la kulturo de Danio kaj belaĵoj de ĝia ĉefurbo kaj aliaj vizitotaj lokoj.

Oni povas aliĝi per reta aliĝilo ĉe www.ilei.info, aŭ sendi retpoŝte simpla-tekstan aliĝilon.

Oni baldaŭ povos ankaŭ elŝuti printeblan aliĝilon kaj printeblan informilon.

*Konferenca temo:*

***Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado***

La temo enfokusigas lingvan politikon kaj sintenon de ŝtataj kaj klerigaj instancoj, konsekvencojn de ties tiutemaj decidoj, staton kaj evolutendencojn de lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado konekse kun la oficiala lingva politiko, kaj pozicion de Esperanto en tiu kunteksto. Aliĝantoj estas bonvenaj proponi siajn kontribuojn al traktado de la konferneca temo, laŭ subtemoj:

- Lingvo de scienca komunikado
- Edukado kaj ekzamenado en gepatra kaj fremdaj lingvoj
- Edukado kaj scienca komunikado per esperanto
- Esperanto en modernaj amaskomunikiloj

**Simpozio**

ILEI ĉi-foje organizas la simpozion kunlabore kun la Universitato de Kopenhago, respektive Departamento pri komunikiloj, kognado kaj komunikado (mcc.ku.dk) de Fakultato de Humanistiko (www.humanities.ku.dk), kiu ankaŭ disponigos la konferencejon kaj simpoziejon.

La simpozio okazos en la lastaj du konferencaj tagoj, 22/23-an de julio, do tagon pli frue ol UK komenciĝos.

La simpozio traktos unuavice sciencajn aspektojn de la konferenca temo enfokusigante la konflikton inter, unuflanke, uzado de la angla kiel internacia lingvo de la scienco kaj, aliflanke, dezirinde nacilingva instruado pri la scienco kaj edukado de science kompetentaj civitanoj.

**Programo de la ILEI-konferenco en Kopenhago 2011**

Dimanĉo: alvenoj kaj interkona vespero.

Lundo: solena malfermo kaj komenco de laboro; dana vespero.

Mardo: daŭrigo de prelegoj, seminarioj, laborkunsidoj; internacia vespero.

Merkredo: ekskursoj kaj alternativaj programeroj; distra vespero.

Ĵaŭdo: pliaj prelegoj, kunsidoj, diskutrondoj; universitata agado; lingva festivalo; bankedo.

Vendredo: simpozia tago kun posttagmeza promenekskurso alternative; adiaŭa vespero-

Sabato: konkluda sesio de la simpozio, solena fermo; transiro al UK

**Aliĝoj kaj mendoj**

Aliĝilo kaj mendilo kun kotiztabelo, prezoj kaj pli detalaj informoj atingeblas rete tra http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php en ambaŭ formoj: por elpresi kaj uzi paperan aliĝilon, aŭ por elektronika aliĝo.Papera aliĝilo aperos ankaŭ en la venonta numero de Internacia Pedagogia Revuo.

Pliaj informoj: info@ilei.info

**La LKK de la Konferenco**

Dum la vizito de prof. Radojica Petrovic en Kopenhago meze de oktobro, estis fondita la Loka Konferenca Komitato. Radojica Petrovic estas la respondeculo de la konferenco antaŭ la estraro de ILEI. Dum la unua kunveno oni interkonsentis pri la diversaj taskoj de LKK, jen la rezulto:

Ileana Schrøder: prezidanto
Arne Casper: kasisto
Betty Ĉatterjee: informado
Zita Garbaraviciene: konferencejo
Bent Jensenius: loĝado
Gosia Nitkowska kaj Jonas Dalmose: kultura programo

Betty Chatterjee malfermis grupon en Facebook pri la konferenco kaj oni povas eniri, se en la serĉilo oni skribas 44 kaj jen la grupo aperas.

ĈU ANKAŬ VI VOLAS IĜI
DELEGITO DE UEA?

**Se vi jam estas membro de UEA dum unu jaro kaj plenumas la ceterajn devojn, vi povas iĝi Delegito, Vicdelegito, Junulara Delegito aŭ Faka Delegito de ĝia Delegita Reto.**

Plenigu la respondilon en la Reta Jarlibro aŭ elŝutu tiun ĉe www.uea.org/asisto.html, plenigu ĝin kaj sendu al via ĉefdelegito. *Nur* se mankas ĉefdelegito en via lando, sendu la plenigitan respondilon al la Centra Oficejo.

*ALIĜU AL NIA RETO!*

# IKU invitas prelegontojn

Dum la 96-a UK en Kopenhago okazos la 63-a sesio de Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, PK 767, IL-71799 Makabim, Modiin, Israelo; rete: amri@xuji.ac.il, ĝis la 31-a de januaro 2011 (sed prefere pli frue).

Lige kun IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kunlabore kun UEA. Proponantoj de IKU-prelego rajtas samtempe proponi AIS-kurson, kies unua prelego estos parto de IKU kaj kiu aldone havos du daŭrigajn prelegojn. Oni bv. indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso.

La prelegoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Estos aparte bonvenaj prelegoj lige kun la kongresa temo ”Dialogo kaj interkompreno”. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto (kune ne pli ol unu paĝo). La proponoj estos prijuĝataj de la IKU-komisiono kaj sekve la Estraro de UEA decidos, kiuj estos akceptitaj. La proponintoj estos informitaj pri la decido ĝis la 30-a de aprilo 2011. La sukcesaj kandidatoj devos sendi kompletan tekston de siaj prelegoj al UEA ĝis la 31-a de majo 2011 por publikigo en la IKU-libro.

Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Prelego estos rekompencita per honorario de 250 EUR. Pliaj detaloj kaj antaŭaj IKU-prelegoj kaj -resumoj troviĝas en la IKU-paĝo http://uea.org/dokumentoj/IKU/ .

*[Ret-Info]*

# Internacia Jaro de la Junularo

***Je la Internacia Junulara Tago la 12-an de aŭgusto 2010 komenciĝis la Internacia Jaro de la Junularo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj. Diference de aliaj temaj jaroj ĝi do ne koincidas kun kalendara jaro. La Estraro de UEA decidis, ke la temo de la 96-a UK de Esperanto en Kopenhago (23-30 julio 2011) rilatos al la Internacia Jaro de la Junularo. Jen materialo de UN pri la celoj de la Jaro.***

La Internacia Jaro de la Junularo, komenciĝante per la ĉiujara Junulara Tago de Unuiĝintaj Nacioj, 12 aŭgusto 2010, festas kaj prilumas la gravecon de gejunuloj ĉirkaŭ la mondo. La kontribuoj de la junularo al la Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC) estas fundamentaj por ilia sukceso, kaj Junularaj Konferencoj kunlabore kun Unuiĝintaj Nacioj respegulas la rolon, kiun gejunuloj ludas por la atingo de evoluo. La junularo estas la estonteco de UN kaj la estonteco de la tuta procedo de evoluo. Aranĝoj kunlige kun la jaro celas igi gejunulojn pli videblaj en la tagordo de internacia evoluigo.

Kun celo ekkapti la energion, imagopovon kaj iniciatemon de la monda junularo en venkado de la defioj, kiujn la homaro frontas, ekde fortigo de la paco ĝis progresigo de ekonomia evoluo, Unuiĝintaj Nacioj proklamis la Internacian Jaron de la Junularo, kiu komenciĝos je la Internacia Junulara Tago la 12-an de aŭgusto 2010, kun la temo ”Dialogo kaj Reciproka Kompreno”. La Ĝenerala Asembleo elektis tiun temon pro sia alta takso de la valoro de dialogo inter gejunuloj el diversaj kulturoj kaj homoj el diversaj generacioj.

”Gejunuloj konsistigas la plej gravan kapitalon en la monda historio por ŝanĝi la estontecon de la homaro”, deklaris kunlaborantoj en la kampanjo de la Internacia Jaro de la Junularo.

”Okaze de la Internacia Junulara Tago, ni renovigu nian promeson subteni gejunulojn en ties evoluo”, emfazis la Ĝenerala Sekretario Ban Ki-Moon en la Festado de la Junulara Tago en 2009. “Ili meritas nian plenan sindediĉon – aliron al edukado, adekvatajn sanservojn, dungajn eblecojn, financajn servojn kaj plenan partoprenon en la publika vivo”, li diris.

Oni celas per la Jaro kuraĝigi gejunulojn sin dediĉi al subteno de progreso, inkluzive atingon de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj, kiuj celas plibonigi la vivojn de la tuta homaro per tranĉo de ekstrema malriĉeco kaj malsato,

redukto de patrina kaj infana mortado, plibonigo de aliro al edukado kaj sanservoj, kune kun aliaj pli specifaj celoj, ĝis la jaro 2015.

## Junularo kaj la JEC

Popolnombraj statistikoj montras, ke nuntempe 1,7 miliardoj da homoj – pli ol unu kvarono de la sesmiliarda enloĝantaro de la mondo – aĝas inter 10 kaj 24 jaroj, tiel ke tiu ĉi grupo de gejunuloj formas la plej grandan nombron de alirantoj al adoltiĝo iam ajn konatan, kaj la plej subreprezentatan elementon de la monda enloĝantaro.

En reta konsultado kun pli ol 350 gejunuloj pri evoluigo, plej multaj respondantoj diris, ke ili scias nenion aŭ preskaŭ nenion pri la JEC. Ili ankaŭ substrekis, ke ili ne havas aliron al adekvataj rimedoj por ties efektivigo; petataj iloj inkluzivis aliron al la reto, aliron kaj trejnadon rilate al informkomunikaj teknologioj (IKT), trejnadon pri komerco kaj civitana edukado, interŝanĝon de informoj, kaj precipe instigadon, financadon kaj rimedojn de registaroj kaj institucioj.

La Internacia Jaro de la Junularo, kaj la temo antaŭenigi dialogon inter gejunuloj kaj kun la mondo, tiras nian atenton al tiuj ĉi bezonoj. Restas nur kvin jaroj ĝis la limdato starigita de la internacia komunumo por atingi la evoluigajn celojn interkonsentitajn en la jaro 2000.

Konsiderante tion, kaj la fakton, ke ni havas tiel grandan junularan enloĝantaron en la mondo, oni rekonas, ke junulare orientita fokuso sur la celoj estas bezonata kaj esenca al la klopodoj efike progresi laŭ perspektiva bazo. La junularo estas la estonteco.

## Festoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉirkaŭ la mondo

Oni festos la Internacian Junularan Tagon la 12-an de aŭgusto 2010 en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko per tutmonda lanĉado de la Internacia Jaro de la Junularo. Komence de septembro oni malfermos al la publiko foto-ekspozicion kun titolo ”Videblaj Voĉoj – Junularaj Perspektivoj pri Mondaj Demandoj” en la akceptejo por vizitantoj ĉe UN.

La Inter-agenteja Reto pri Junulara Evoluigo de UN kunordigas la agadon de la Jaro, kaj la Junulara Programo de UN gvidata de la Fako pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj ludas gvidan rolon en tiuj ĉi klopodoj, strebante al pliefikigo per fortigado de kunlaboro kaj interŝanĝoj inter ĉiuj elementoj de UN, kiuj okupiĝas pri la junularo. La Kadra Aliro de UN al la

Internacia Jaro de la Junularo estis akceptita en februaro 2010 por liveri konkretan kadron por la agado kaj fiksi strategiajn celojn. La Kadro elstarigas la neceson krei konsciiĝon per intensigo de sindediĉo al la junularo kaj investado en ĝi, per mobilizo kaj engaĝo de la junularo per pli granda junulara partopreno kaj partnerecoj, kaj per kunligado kaj konstruo de pontoj por plifortigi interkulturan komprenon inter gejunuloj.

Ankaŭ la Programo de UN pri la Junularo organizas agadon por engaĝi gejunulojn, inkluzive konsultadon per Facebook, kie gejunuloj jam kontribuis preskaŭ 500 sugestojn por la slogano de la jaro, ”Nia Jaro. Nia Voĉo”. Ĉiumonate okazas retaj konsultadoj pri temoj ligitaj al la Jaro kaj oni metas kontribuojn en la monatan elektronikan novaĵleteron de la Programo de UN pri la Junularo, ”Youth Flash”, ”Junulara Ekbrilo”.

Ĉirkaŭ la mondo, daŭros la festoj, inkluzive de la 5-a Monda Junulara Kongreso en Turkio, la Unua Junulara Olimpiko en Singapuro, kaj la Monda Junulara Konferenco en Meksiko. Gejunuloj organizas ankaŭ lokajn kaj regionajn aranĝojn kiel okazojn por diskuti kaj pripensi la rolon de gejunuloj en la atingo de evoluo, kun speciala emfazo al la JEC.

En la Internacia Jaro temas pri antaŭenigo de plena kaj efika partopreno de la junularo en ĉiuj aspektoj de la socio. Ĉiuj sektoroj de la socio estas instigataj labori partnere kun la junularo kaj junularaj organizaĵoj por pli bone kompreni iliajn bezonojn kaj preokupojn kaj por rekoni la kontribuojn, kiujn ili kapablas fari al la socio.

La progreso farita en tiu ĉi jaro formos fundamenton por plia laboro en junulara evoluigo, inkluzive realigon de la Monda Programo de Agado por Junularo kaj la atingon de la JEC.

**Pliaj informoj:**

Retpaĝaro de la Junulara Jaro: social.un.org/youthyear/

Por aboni la senpagan retan novaĵleteron ”Junulara Ekbrilo”: www.un.org/esa/socdev/unyin/flash.htm

Por fariĝi amiko Facebook de la Programo de UN pri la Junularo: www.facebook.com/UNyouth

Kalendaro de junularaj aranĝoj: social.un.org/youthyear/

Esplora referaĵo: www.equip123.net/equip3/docs/YAC/YouthandMDGs.pdf

[Fonto: Fako de UN pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj].

# Kopenhago

Prezidanto: Betty Chatterjee, chatterjeebetty@hotmail.com. La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo okazas **ĉiun lundon ekde la 19:00** en Tomsgårdsvej 35, 2400 Kopenhago NV. Ni troveblas ankaŭ en Facebook ĉe "Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo".

8.11 Kultura Vespero. Kulturo estas malkonciza koncepto tial : Venu paroli pri ŝatata filmo! Prezentu belegan pentraĵon ! Rakontu pri novelo ! Igu nin kanti esperantan rokan kanton! Surprizu nin per iu ajn Nur venu kulturumi ! ?

15.11 Kvizo-vespero pri Esperanto. Ana Ĉumbelic Røssum cerbumigos nin.

22.11 Studgrupo.

29.11 Studgrupo.

6.12 Intergeneracia kunlaboro. Jen taŭga temo rilate al la venontjara Universala Kongreso. Kunlabore kun DEJO.

12.12 Ni festenas Zamenhoftagon en nia kunvenejo. Vidu la anoncon sur la sekva paĝo.

10.1 Betty Chatterjee rakontos pri siaj spertoj dum la novjara festivalo en Nordlingen.

17.1 Konversacia rondo.

24.1 Ni rololudos denove.

31.1 Studgrupo. Marvirinstrato: Tri Ruĝaj knabinoj

7.2 Rogier Huurman prelegos pri 'La Interreto kaj kopirajtoj'.

14.2 Konversacia rondo.

21.2 La internacia tago de la denaska lingvo. (la 20-a februaro)

28.2 Jarkunveno de KEK.

Pri la kluba kotizo 2011. Ni petas al vi ke vi pagu vian kotizon K.E.K.-an. Tiu estas 200 kronoj por indivuaj membroj kaj 300 kronoj por familioj. KEK-konto: 1551-2025558. Vi povas ankaŭ peti al la kasistino (Kamma Tranum), ke ŝi sendu al vi ĝirilon, aŭ kompreneble vi povos klubvespere pagi la kotizon.

## *La kopenhaga Zamenhofo-festo 2010.*

*La ĉi-jara temo de la festo estas 'La familio zamenhofa'.*

*Ludoviko Zamenhof nia animpatra patro naskiĝis la 15-an de decembro 1859, iom frue ni invitas vin partopreni lian 151-an naskiĝdat-revenan feston la 12-an de decembro je la 13-a. en la kulturdomo, Tomgårdsvej 35, 2400 Kopenhago NV.*

*La Programo:*

- *Lunĉo. Ampleksa kaj bongusta festmanĝo por vegeteranoj kaj malvegeteranoj. De la 13a – 14a horo.*
- *Festparolado (Betty )*
- *Mathias kaj Amir muzikumos.*
- *Jens prezentos la membrojn de la zamenhofa familio.*
- *Kafa paŭzo.*
- *Ni kantu.*

*La prezo estos 100 kronoj por la lunĉo, kafo/teo kaj kukoj. Aliaj trinkaĵoj aĉeteblos surloke. Vi povos enpagi la monon en la KEK-konton: 1551-2025558 aŭ al estrarano de KEK. Karaj vegeteranaj aliĝontoj, ne forgesu informi nin pri tio.*

*Bonvolu tuj aliĝi aŭ plej laste la 6-an de decembro.*



*Dufoje dum la jaro estas aŭkcio en la Konversacia Esperanto-Klubo  favore al la Fondaĵo por Esperanto-domo. Ĉi tiuj bildoj estas de la 25-a de oktobro. Supre foto de la libroj aŭkciotaj kaj malsupre Rogier Huurman en la rolo de aŭkciestro provante vendi ... ion ne libran.*



# Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk - Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenciĝo-horoj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj. Rigardu ankaŭ la hejmpaĝon: www.esperanto-i-naestved.dk.

***Okazos:***

Ve 19.11 je 14.00: Pritrakto de ĉapitro 37 de F+F.

Ve 10.12 je 14.00: Jul-aranĝo kun ruĝa vino, manĝetoj kaj ujutno

Post tio julferio ĝis

Ve 14.01 je 19.00: DEFA-kunveno kun fervojfaka temo.

Ve 28.01 je 14.00: Pritrakto de ĉapitro 38 de F+F.

Ve 04.02 je 19.30: Danlingva prelego. Lene kaj Jan Niemann rakontos.

Ve 11.02 je 19.00: DEFA-kunveno kun fervojfaka temo.

Ve 18.02 je 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN.

Ve 25.02 je 14.00: Pritrakto de ĉapitro 39 de F+F.

Ve 04.03 je 19.30: Danlingva prelego pri pastra laboro inter soldatoj.

Ve 18.03 je 19.00: DEFA-kunveno kun fervojfaka temo.

Ve 25.03 je 14.00: Pritrakto de ĉapitro 40 de F+F.

Ve 08.04 je 19.30: Sezonfina aranĝo kun manĝeto, trinkaĵo kaj ujutno.

***Okazis:***

01.10. rakontis Ole Blaust pri siaj planoj rilate Esperanto-lernejon en Næstved kaj Zita pri sia vivo kaj pri la litova lingvo. Ambaŭ parolis dane, ĉar la aranĝo estis anoncita en certaj lokaj medioj. Gratulon, Zita, pro via kono kaj uzo de la dana! – 22.10. la diligentaj studgrupanoj severe laboris pri teksto, sed poste grumblis pro nesufiĉa konversacia trejnado. Pripensinde.

# Gazeteltondaĵoj

Septembro:

Jernbanefritid: Et ungdomsinitiativ, der rækker videre.

Oktobro:

Hjemmet: Krucvortenigmo.

Jernbanefritid: Flere, end jeg kan nå …

Vegetaren: Artikoleto pri Leo Tolstoj, kunfondinto de Esperanto-vegetara unuiĝo.

Berlingske Tidende: Sven Ziegler 75-jara.

Korekto al n-ro 4 de Esperanto en Danio paĝo 14:

Estas Frederiksværk Ugeblad, kiu la 24.08. havas artikolon pri Peter Weide en Ĉinio.

Ni daŭre insiste instigas vin sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

## 3D-filmo en Esperanto!

La rusia filmstudio ”Itak” iĝis verŝajne la monda pioniro pri 3-dimensiaj Esperantaj filmoj: kunlaborantoj de ´Studio Itak´ preparis la unuan parton de la lernu-kurso ”Ana” en tridimensia animacia versio.

La produktintoj estas nefanfaronemaj, la filmeto ekzistas en silento jam preskaŭ tutan jaron. Gratulon al la talenta rusa teamo, animacia studio de la nova generacio. Ni esperas spekti multajn iliajn ontajn Esperantajn produktojn.

La 3D-versio de Ana Pana estas videbla ĉe: itak-studio.ru/30-10-2009/videouroki-eto-kruto.html

Pli frua, konata animacia filmo de la studianoj en Esperanto estis ”Limonado” (kun selektebla subteksta lingvo), videbla ĉe: www.youtube.com/watch?v=30T0yycjHNw

*[Ret-Info]*

# Datreveno



La 14-an de oktobro estis precize la centa datreveno de la morto de Frederik de Skeel-Giörling, kiu reale enkondukis Esperanton en Danion. Lia unua rimarkinda laboro estis verkado de Esperanto-dana-norvega vortaro, kiu aperis en la jaro 1904. Jam en 1905 aperis lia Lernolibro en Esperanto kun rekomendo de prof. Jespersen, kaj en 1906 li fondis la mallongvivan ”Societo de Danaj Esperantistoj” kaj redaktoris ĝian organon “Helpa lingvo”.

En la jaro 1907 la gazeto Politiken starigis siajn grandajn kursojn en esperanto kaj alvokis Skeel-Giörling al Kopenhago por gvidi ilin. En 1908 li kun Marie Schrøder fondis la “Konversacian Esperantistan Klubon” kaj estis inter la fondintoj de “Centra Dana Esperantista Ligo” (la nuna DEA), kie li ankaŭ surprenis prezidan kaj redaktoran taskon dum kekaj jaroj.

La plej ĝoja esperanta okazintaĵo dum lia restado en Kopenhago certe estis la tago, kiam li salutis d-ron Zamenhof kiel gaston en Kopenhago dum la postkongresaj tagoj en 1908. Li ofte parolis pri tiuj tagoj, neforgeseblaj al li, kiam li staris vid-al-vide kun viro, kiun li jam longe admiris.

Kiel sekretario por Danio li faris grandan laboron por la ”Delegitaro” en Parizo 1907. De la momento kiam la delegitara komitato t5ransiris sian mandaton kaj rekomendis la anoniman projekton “Ido”, Skeel-Giörling fariĝis la plej akra kontraŭbatalanto de la Idista movado.

Liaj talentoj estis rimarkitaj ankaŭ eksterlande, do meze de marto 1910 li vojaĝis al Parizo kaj poste al Bruselo, kie li prezentis Esperanton al la multaj kongresoj, kiuj okazis dum la ekspozicia tempo, kaj kie li redaktis la ”Kongresa Revuo” kaj france kaj Esperante. Intertraktante kun la ”Internacia Bibliografia Instituto” en Bruselo li sukcesis oficiale akceptigi al ĝi la lingvon, kio estis konsiderata kiel grandega venko por Esperanto, ĉar la instituto estis subvenciita de la belga ŝtato.

Li malaperis same subite kaj tragedie kiel Marie Schrøder, dronante en kanalo, antaŭ ol povi transpreni la taskon kiel redaktoro de la planata “Revuo de la internacia vivo”. Nobla, afabla kaj ĉiam modesta homo sensence pereis, sed postlasis ekzemplon al siaj posteuloj.

# Vivanta aŭ mortanta lingvo?

Jen ne malkutima konversacio:

– Esperanto estas la plej facila lingvo en la tuta mondo!

– Ĉu vere! Do mi lernu ĝin!

Post mallonga tempo tiaj kredemuloj ekkonscias, ke eĉ la plej facila lingvo en la mondo havas lernendajn gramatikon, prononcadon, vortprovizon kaj bedaŭrinde malfacilaĵojn. Post kiam multaj rapide malaperas de la movado, kelkaj restadas kiel eternaj komencantoj kaj kelkaj studadas kaj finfine lernas la lingvon.

Antaŭ semajno pere de Skajpo mi konatiĝis kun Viki, esperantistino el Kroatio. Ŝi invitis min partopreni skajpan konferencon kun samideanoj el Ĉinio, Japanio, Rusio, Francio kaj Germanio. Oni estis senhezite babil-emaj, kaj regis bona etoso en la grupeto. La konversacio temis pri ĉiutagaj aferoj. La plejparto el partoprenantoj estis spertaj esperantoparolantoj.

Unu el la plej flue parolantaj estis la 50-jaraĝa gastigantino. Kiam Viki havis 17 jarojn ŝi studis la 8 unuajn lekcionojn de la ’Zagreba metodo’, partoprenis unu kongreson kaj poste malaperis de la movado por ke ‘mi vivu la normalan vivon’.

En la jaro 2004 pro malbona sanstato Viki perdis sian laboron, kaj ek de tiam jam ne sukcesas trovi laborpostenon; dungantoj preferas junajn angle-parolantojn. Do ŝi komencis lerni la anglan pere de www.livemocha.com. Tiu sinjorino estas unu el la personoj, kiuj tre facile lernas novajn lingvojn aŭskultante kaj parolante, tial ŝi serĉis angleparolantojn pere de Livemocha kaj skajpo. Tamen ŝi ne vere sukcesis trovi helpemajn parolantojn de la angla. Intertempe ŝi re-ekkonsciis pri la ekzisto de Esperanto kaj post 33 jara paŭzo la 4-an de junio 2010 ŝi elektis relerni ĝin.

Viki rakontis al mi, ke eĉ se ŝi bezonas la anglan por labori, ŝi opinias, ke Esperanto utilas je la internacia amikeco kaj la paco. Laŭ ŝia opinio la lingvo certigas pli grandajn eblecojn por la homaro loĝanta en malriĉaj landoj. Plue por certigi la evoluon de la lingvo ĉiuj esperantistoj devus ĉiutage babili ekzemple pere de Skajpo. Do ĉiutage Viki aranĝas du skajpajn konferencojn; posttagmeze kun esperantistoj el Azio kaj vespere kun eŭropanoj.

Ne ĉiuj el ni estas tiom babilemaj kiel ŝi. Multaj el ni preferas legi aŭ skribi nian lingvon. Ĝis nun Viki mem ne jam legis librojn aŭ gazetojn ktp. Krom la studado de la tekstoj de Livemocha kaj de malnova libro de gramatiko ŝi jam bone lernas la lingvon per la ada babilado kaj la aŭskultado de la radio-dissendoj de Pollando kaj Radio Verda. Ŝi diris al mi, ke Esperanto estas vivanta lingvo, tial ni nepre praktiku la lingvon. Eĉ se ŝi verŝajne estas nekutime talenta persono, ŝia atingo post mallonga studado estas ege impona.

Ĉe la skajpa profilo de la sinjorino legeblas ŝia slogano:

'Sal! Se ni volas, ke Esperanto daŭras, tiam estas grave uzi ĝin kaj PAROLU. Ne necesas esti perfekta – estu babilema, amikema, tolerema..'

Plue ŝi retorike demandis al mi: 'Kie estas Esperantujo? Esperantujo estas ĉi tie pere de Skajpo!'

Certe, iu protestos minimume pro ŝia uzado de la vorto 'sal', ĉu ne? Ŝajnas al mi, ke grava faceto de la Esperanta kulturo estas la (tro) ega pedanteco. Kiel relative nova esperantisto legema kaj skribema mi mem suferas je la arda strebado perfektigi la lingvon. Mi demandis al mi mem, kiom da novaj memkulpigantaj esperantistoj malaperas pro la timo pri gramatikaj eraroj?

Pro la venontjara kongreso ni bezonas plibonigi niajn lingvajn kapablojn. Laŭ mia opinio endas kuraĝemiĝi tiel kiel la sinjorino el Kroatio. Ne sufiĉas nur babili unu fojon semajne en nia klubo.

Ĉu mi postulas, ke ĉiuj devas skajpi? Tute ne! Mi nur opinias, ke Skajpo estas unu el la eblecoj por vivigi kaj evoluigi nian lingvon. Hieraŭ mi mem aranĝis skajpan konferencon kaj babilis kun esperantistoj el Finlando, Pakistano kaj Kroatio.

Do karaj geamikoj, ĉu ni skajpu aŭ ĉu ni eltrovu aliajn babililejojn en la nevirtuala mondo?

*Betty Chatterjee*

# Interesiĝo de la ekstera mondo



Kelkfoje oni devas miri pri la iniciatemo kaj esperantismo de iuj ne-Esperantoparolantoj. En septembro ĉi-jare la esperantista mondo surprize eksciis pri la mallonga filmo *Senmova*, kiu jam pasintjare estis prezentita en kelkaj kinofestivaloj. Ĝi okazas en imaga lando, kaj la dialogo estas en surprize bona Esperanto (kun anglaj subtekstoj – spektebla interalie ĉe la retejo www.tugcesen.com ).

La filmon faris **Tuğçe Madayanti Sen**, kiu devenas el Turkio. Ŝi estas reĝisoro, scenaristo kaj fotisto, kaj finis siajn studojn pri filmado en la Universitato de Cincinnati en Usono, kie ŝi ricevis plurajn premiojn. Post tio, ŝi laboris en usona televidkanalo kaj poste revenis en Turkion, kie ŝi laboris por Istanbula televido kaj por filma studio kaj nun studas arkeologion. Laŭ intervjuo kiun ŝi faris por Libera Folio, ŝi intencas iam fari pliajn filmojn en Esperanto.



Samtempe Esperanto grave rolas en novaj usonaj teatraĵo kaj romano. La reĝisorino **Julie Cho** enscenigis *The language archive* (La lingvoarkivo) kiu temas pri la geedzecaj problemoj de lingvisto-esperantisto. La teatraĵo multe klarigas pri tio kio estas Esperanto, fakte tiom ke unu aktoro rolas Zamenhofon.

La frua periodo de Esperanto estas ankaŭ la fono de la tre favore recenzita romano *A curable romantic* (Kuracebla romantikulo) de **Jonathan Skibell**, konata usona verkisto. Li estas universitata profesoro pri literaturo, ricevinto de literaturaj premioj kaj regas Esperanton.

Por la romano li konsultis plurajn usonajn kaj eŭropajn e-istojn pri historiaj faktoj kaj lingvaĵo de uzitaj Esperantaj frazoj. Ĝia agado okazas precipe en Vieno, kaj krom Zamenhof kaj aliaj famaj esperantistoj rolas en ĝi precipe Sigmund Freud kaj la tuta juda medio tiutempa.



Eble vi ankoraŭ memoras **Arika Okrent**, kiu verkis la libron *In the land of invented languages* (En la lando de inventitaj lingvoj). La 17an de septembro ŝi estis telefone intervjuita en la gravega televidstacio CNN dum kelkaj minutoj kadre de la programo *Connect the world* (Kunligi la mondon). Ĉi tiu programo celas prezenti la fonon malantaŭ la aktualaj novaĵoj, kaj tiusemajne ĝi aparte traktis la temon de lingvoj. La intervjuantino Becky Anderson ŝajne ne estis tro seriozema pri la afero, sed el la intervjuo evidentiĝis ke se oni entute povas preni lingvojn serioze, tiam eblas ankaŭ pri Esperanto.



Fine, ni notu iniciaton devenantan pli rekte el la organizita movado. La Eldona Fako Kooperativa de Sennacieca Asocio Tutmonda decidis produkti profesian filmon pri Esperanto. Por tio la kooperativo dungis la filmiston **Dominique Gautier**. Li komencis filmi en novembro 2009 kaj atendeble la filmo aperos en marto 2011.

La ambicia projekto celas produkti profesian dokumentan filmon pri la esperantista movado. SAT-EFK estas la produktantoj de la filmo, dum la reĝisoro Dominique Gautier estos ĝia aŭtoro. La filmo do transdonos lian vidpunkton pri nia movado, kiun li malkovras dum la filmado. SAT ne celas produkti memreklaman aŭ propagandan filmon,.opiniante ke tio estas la ĉefa kondiĉo, por ke ĝi ricevu veran eĥon antaŭ la publiko. Pli da informoj pri la filmo oni povas vidi rete ĉe esperantofilmo.com

# Honorigo de Zsófia Kóródy

Dum solena festo en la kavalira salono de la kastelo Herzberg am Harz s-ino Zsófia Kóródy ricevis publikan distingon por la pli ol 7-jara honorofica aktiva agado sur diversaj kampoj por Esperanto kaj la oficiala Esperanto-urbo Herzberg.




La urbestro Gerhard Walter emfazis la multflankan kaj senlacan agadon, ekzemple por la GEA-filio por klerigado kaj kulturo, kiel prezidantino de AGEI, kiel komisiitino de GEA por instruado, organizantino por internaciaj lernejaj projektoj, por la sukcesaj ĝemelurbaj aktivadoj inter Herzberg kaj Gora/PL, pro la meritoj rilate al la enkonduko de Esperanto-ekzamenoj laŭ la Eŭropa Referenckadro, kiel estrarano de ILEI, por la granda Esperanto-biblioteko en Herzberg, ktp.

La ĉefo de la Esperanto-urbo Herzberg aparte dankis al Zsófia Kóródy kaj transdonis gratul-dokumenton kaj ombrelon kun la alloga surskribo "Herzberg ... la Esperanto-urbo".

Ĉeestis nemalmultaj poltikistoj kaj reprezentantoj de aliaj asocioj kaj kulturgrupoj.

Gerhard Walter substrekis la valoron “Esperanto” por Herzberg kaj anoncis akceladon de la poresperantaj agadoj. Jen bonaj ekzemploj: baldaŭa fondo de speciala Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg, starigon de tiel nomataj “kontinentaj Esperanto-domoj”, ekz. “Azia Esperanto-domo”. Do, tio estas belaj kaj realigendaj paŝoj en ne tro fora futuro. Bv. serioze kunkonstrui la Esperanto-urbon Herzberg!




Ni elkore gratulas al Zsófia Kóródy kaj deziras al ŝi bonan sanstaton, feliĉon kaj pluajn sukcesojn ”sur la vere esperiga verda pado”.

*Petro Zilvar el Herzberg*

*[Ret-Info]*

# Relanĉo de Edukado.net



Pli ol 32.000 eŭroj, donacitaj de esperantistoj, estis investitaj en la kompleta rekonstruo de la instruista paĝaro Edukado.net. La paĝaro estis fondita de Katalin Kováts en la jaro 2001 por subteni kaj helpi instruantojn de Esperanto. La ideo estis havi tutmonde alireblan datumbankon por lerniloj, ekzercoj, neeldonitaj instrumaterialoj, kiujn la Esperanto-instruistoj alie kreas, uzas eble unufoje kaj poste forgesas en tirkestoj.




Komence la projekto estis grandparte financita de la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj la unua versio estis konstruita de esperantistoj, ĉefe volontule. Tamen baldaŭ la tuto iĝis tro ampleksa por volontuloj, kaj en la jaro 2004 oni transdonis la teknikan flankon al ne-esperantista firmao. La elekto montriĝis nesukcesa, kaj fine evidentiĝis, ke necesas kompleta rekonstruo de la tuto por savi kaj evoluigi la ampleksan enhavon.




La konstruado de la nuna versio komenciĝis en la somero 2009 kaj daŭris unu jaron. Komence de somero 2010 la retejo pretiĝis laŭ la planoj de Katalin Kováts kaj en efektivigo de Studio GAUS, entrepreno de la rusa esperantisto Jevgenij Gaus. En la testado partoprenis Frank Huber el Germanio kaj Mónika Molnár el Svislando. Fine la 3-an de oktobro ĉi-jare estis lanĉita la nova paĝaro.




Edukado.net nun estas facile navigebla informejo pri la ekzistantaj kaj eldonitaj lerniloj (libroj, film- kaj sonmaterialoj, afiŝoj kaj ludiloj), aperintaj dise en la mondo. Ĝi enhavas ankaŭ forumon kun jam pli ol du mil uzantoj. Okazas vigla kunlaboro kun UEA, Radio Verda, ILEI, lernu! kaj multaj aliaj.




Ekde la naskiĝo de la ideo ĝis la nuna tempo la paĝaro estas redaktata kaj mastrumata de Katalin Kováts, kies laboron tempo al tempo helpas kelkaj volontuloj, ĉefe ŝiaj eksstudentoj kaj familianoj.

## Pli ol 15 000 tradukitaj Esperanto-frazoj

Se oni serĉas ion en vortaro, ofte komenciĝas la divenado: Kiu vorto en la cellingvo estas la bona, kiu el la signifoj de la elira vorto rilatas al kiu celvorto?

La japana iniciato tatoeba. org/epo pro tio rilatigas kompletajn frazojn, en multaj lingvoj, ankaŭ Esperanto. Intertempe Esperanto havas pli ol 15 000 frazojn kaj lokon 5 inter la diversaj lingvoj. La aktuala kresko estas pluraj cent frazoj tage; antaŭ du monatoj estis nur ĉ. mil Esperanto-frazoj en la frazaro.

Se oni volas helpi en la traduka tasko, necesas registriĝi. Sur paĝo de hazardaj tradukendaj frazoj eblas montri ankaŭ 15 frazojn samtempe, se oni volas traduki amase kaj ŝpari atendotempon:

tatoeba. org/deu/sentence s/several_ random_sentences

Plezuron kun la paĝaro

*Lu Wunsch-Rolshoven [esper-inform]*

# Tago de la Bunteco

Varbado por Esperanto povas okazi alimaniere, ĉu ne?

Samtempe ekflugis gasbalonoj kun la surskriboj en la lingvoj angla, germana, pola kaj Esperanto ”Kontraŭ rasismo”.

Krom Herzberg partoprenis la ĝemelurboj de Osterode am Harz: Ostroda en Pollando, Scarborough en Britio kaj ĝemelurbo de Herzberg am Harz: Góra en Pollando.

En Herzberg kaj Góra la Esperanto-kluboj, geamikoj helpis kunordigi la farendaĵojn por tiu tago de la projekto ”Vielfalt tut gut” (bunteco bonas), kiun iniciatis la germana Ministerio por Familio, Maljunuloj, Virinoj kaj Junularo.



La tagan buntan programon riĉigis muziko, dancoj, ekspozicio, kuirado, sporto, ludoj, informbudoj.

La ĉefa atrakcio tamen estis la samtempa ekflugigo de po 500 gasbalonoj el la partneraj urboj de tri landoj, simbole al solidareco, kunlaboro, alvoko kontraŭ rasismo kaj al interpopola kompreniĝo. La multkoloraj balonoj havis surskribojn en la pola, angla, germana kaj plej grandlitere en Esperanto.




La centra evento de tiu tago okazis en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, kie centoj da homoj, lernejanoj, plenkreskuloj, anoj de diversaj kluboj, minoritataj kaj kulturgrupoj el la regiono, pensiuloj partoprenis la internacian agadon, kies ĉeforganizanto estis la subdistrikta administracio. Aperis kelkaj gazetartikoloj kaj ankaŭ sur la hejmpaĝoj de la urboj Herzberg kaj Góra vi trovas

multajn informojn kaj bildseriojn.

Jen bona ekzemplo. Jam je la dua fojo Interkultura Centro Herzberg (ICH) estis partoprenanto ĉe la speciala interkultura aranĝo, nome je "Tago de la multeco" en la subdistrikto Osterode am Harz.




Centoj da homoj denove spertis Esperanton en realaj situacioj. Ĉiam pli da gejunuloj interesiĝas pri Esperanto-instruado.



ICH havis informbudon kaj informis pri Esperanto. Zsofia Korody montris bildkartludojn por interes prezenti la lingvon Esperanto. Tio aparte plaĉis al multaj plenkreskuloj kaj infanoj, kiuj ekde tiam jam kelkfoje vizitis la Esperanto-centron por daŭrigi lernadon. Nia internacia gasto Kimie Markarian (el Britio/ Japanio) ofertis origamion, faldadon de interesaj figuroj el belaj koloraj paperoj, kiu allogis multajn al nia tablo kaj estis aparte interesa programero. Poste ŝi estis invitita al novaj prezentadoj ekz. en lernejoj kaj infanklubo.

*[Peter Zilvar, Zsofia Korody]*

# Jarmilaj evoluigaj celoj kaj la demando pri komunikado

Vi eble memoras, ke dum longa tempo mi daŭre insistas, ke la fina kaj oka Evoluiga Celo, "Starigi tutmondan partnerecon por evoluigo," rekte rilatas al nia Afero. En parolado ĉe la konferenco de neregistaraj organizaĵoj, en Novjorko, antaŭ kelkaj jaroj mi argumentis, ke la evoluigaj planoj estas farataj en la grandaj naciaj lingvoj, sed ke la muro inter tiuj lingvoj kaj la lingvoj de la homoj, kiujn tiuj planoj tuŝas, estas tiel granda, ke okazas eĉ en plej bona okazo nesufiĉa konsultado kun la ordinaraj homoj.

Temas pri speco de instituciigita lingva diskriminacio.

Nun aliaj homoj venis al similaj konkludoj. Inter 9 kaj 11 novembro 2010 okazos en Bankoko konferenco organizita de koalicio de organizaĵoj el la tielnomata Asia Multilingual Education Working Group (Laborgrupo por multlingva edukado en Azio). Inter tiuj organizajxoj estas Unesko kaj Unicef kaj pluraj grandaj NROj (Save the Children, CARE, ktp.)

La ĉefaj temoj de la konferenco estos: la stato de evoluo de etnolingvaj minoritatoj, la signifo de la lokaj lingvoj en atingo de edukaj kaj evoluigaj celoj, kaj la realigon de programoj kaj politikoj kiuj pli bone atingas tiujn neadekvate servitajn grupojn.

En la anonco pri la konferenco, la celo de la konferenco estas prezentata jene: "Lingvoj estas pli ol iloj de komunikado: ili helpas muldi la identecon de individuoj kaj grupoj dum ili ankaŭ rolas kiel ŝlosilaj elementoj en socialintegriĝo kaj kultura evoluo. Tial, lingvo estas strategie gravaj en atingo de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj kaj en la programo Edukado pro Ĉiuj. Malgraŭ sumaj gajnoj tutmonde en atingo de tiuj celoj, la evolustato de etnolingvaj minoritatoj de la mondo ankoraŭ postrestas, tial ke tiuj minoritatoj riskas eĉ pli grandajn malegalecojn en klopodoj superi malriĉecon, analfabetecon, kaj malsanon; kaj kreskas la risko de konfliktoj pro ekskludo. La konferenco celas liveri forumon por plibonigi kompreniĝon, inspiri signifan agadon kaj faciligi aliron al edukado kaj evoluigaj eblecoj por etnolingvaj komunumoj…."

UEA nepre devus havi sian rolon en tiu diskutado kaj partopreni la debaton.

*[mesaĝo de Prof. Humphrey Tonkin]*

# Mendo de revuoj por 2011

La jarfino alproksimiĝas kaj nun estas tempo por mendi revuojn.

Bv pagi rekte al nia konto reg 3627, konto 645 7274, indikante la kodo(j)n kaj ankaŭ memori ke la limdato por enpago estos

**la 1-a de decembro 2010 !**

Pli poste ni ne povos transigi la sumon antaŭ la 31-a de decembro.

Dankon !

| Kodo | Nomo | abonprezo DKK | |
|---|---|---|---|
| OdE | Ondo de Esperanto | 285.- | |
| LE | La Espero | 170.- | |
| RE | Revuo Esperanto | 285.- | |
| NV | Naturista Vivo | 120.- | |
| LJ | La Jaro | 41.- | |
| JA | Juna Amiko | 110.- | |
| Mon | Monato | 366.- | |
| BA | Beletra Almanako | 275.- | (3 numeroj en 2011) |
| FE | Femina | 190.- | |
| LF | Literatura Foiro | 270.- | |

# Instruuista vizito

*Denove Kopenhagon vizitis Radojica Petrović cele al instruado en konversacia kurso. Jen unu flanko de la lernantaro ...*





*.. kaj jen la alia*

*La instruejo ne estis tiel malvasta, do oni ankaŭ povis praktiki lernadon promenante.*

